

& Preciza Raporto pri la Dekkvina Kongreso en Nürenberg de nia Usona Amiko Sam Ideano:

< Rekante 16 el 31 batoj por strofo, entute 868 paŝoj dum 10 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929) kun piednoto: (*) Koscia misuzo de la "licentia poetica"; sed pro la rimo nia Sam-ideano vidas pli bone per la oreloj. Baladigis Martin Strid (2016) per novaj rekantaĵoj kaj melodio inspirab usona himno. Klarigo (*) '5 Germanajon trafis en la 1920-aj jaroj inflaciego.>

(#Melodio:

<:31> (o;so /so fami mi remi mi remi mi re;mi mi remi so miso sofami re re;

(#Rekantaĵe: rere dire re dilre fa a mi; rere do relmi so lalti la a so)

)×28)+

(&Strofoj:

'1 "Mi /lasis Usonon, – jen grava signifo – ;
Kun ĝoja ekspiro kaj... granda soifo,

(×: #B: **Bravaj kamaradoj, drinku ;
Babilade nin konvinku.**)

Kun /belaj esperoj kaj multaj dolaroj ; Alvenis
en lando de l' bravaj bavaroj.

(×: #B)

'2 Mi diros mallonge pri l' urbo kongresa, ; Ke
vere ĝi estas tre, tre interesa, Neniam mi
vidis per propraj oreloj (*) ; Pli multe da plenaj
bierobareloj!

'3 Malferma kunsido! – Kortuŝa momento! ;
Kaj ĉiuj ekploris dum laŭta silento, –
Ĉeestis multege da homoj, ververe, ; Pro
manko de loko mi restis ekstere.

'4 Mi restis ekstere de l' homa amaso ; Kaj
sidis prudente sur granda teraso, Mi tie
precize kun ŝaga bavaro ; Kalkulis la nombron
de l' kongresanaro:

'5 Ne enkalkulite idistaj friponoj ; Sendube
ĉeestis ducentmilionoj! Mi devas aldoni,
ke tiom, en tuto, ; Kalkulis ni laŭ la germana
valuto*.

'6 Dum tiu ĉi tempo, per urĝa decido, ; Ĵus
estis fermita l' unua kunsido, Kaj ĉiuj
aplaŭdis kaj longa ekkrio ; Pliigis la ĉarmon de
l' ceremonio... ..

'7 La dua kunsido dum tri aŭ kvar horoj ; Sin
devis okupi pri gravaj laboroj, Mi iris, ĉar
iom mi estis scivola, ; Kaj – krom prezidanto
mi estis la sola!

'8 Sed la prezidanto post mia alveno ; Parolis
ĝentile pri kora bonveno, Kaj li min salutis
per flataj titoloj ; En nomo de ĉiuj afrikaj
popoloj.

'9 Responde al tiu afabla persono ; Mi donis
salutojn el seka Usono, Li dankis laŭdece
kaj nun senriproĉe ; Ni ambaŭ ekkantis la
himnon kvarvoĉe!

'10 Ni ankaŭ respektis kutiman programon ;
Kaj sendis gratulan saluttelegramon Al ĉiu
ministro de la Respubliko, ; ... Ĉar tio utilas
por la statistiko!!

'11 Mi poste proponis, pro manko de loko, ;
Prokrasti l' kunsidon ĝis nova epoko, Ni
ambaŭ aplaŭdis kaj longa ekkrio ; Pliigis la
ĉarmon de l' ceremonio!

'12 Sed antaŭ disiro, laŭ pia kutimo, ; Protestis
mi kontraŭ la seka reĝimo, Kaj tuj de l'
paroloj mi paŝis al agoj ; Kaj trinkis senhalte
dum tutaj tri tagoj:

'13 Post tio dek horojn en lito mi restis, ; Kaj
ellitiĝinte mi ree protestis, Ĉar oni akceptis
per laŭta jes-krio ; Pornova kongreso la urbon
Sofio... ..

'14 Sofio, Sofio! – Ho stulta decido ; Plenplena
je ruza insida perfido! Ĉu do vi ne vidas?
Kun lerta modifo ; En vorto "Sofio" sin kaŝas
"SOIFO!"... ..